
Turangoj 25 Luko




1-a trimestro 2012

En tiu numero vi legos..

Ĉu jam via forko vundis vin ? Dominique Baron rakontas la historion de tiu tre utila manĝilaro.	p.1 p.2
Jean-Jacques Moreau promenigas nin tandeme sur insulo Kubo.	p.2 ĝis p.4
La retmesaĝoj estas nova rimedo por korespondi... sed ĉu, post 80 jaroj, iu povos legi ilin ? Jacques Gaumé legis okdekjaraĝajn leterojn de turangia esperantisto.	p.4 ĝis p.6
Jean Louis Le Brizault prezentas al ni la mangaon "La Flambirdo".	p.6 p.7
Okaze de ekskurso dum la UK de Kopenhago, Franca Cipriani, trapasis la ponton Oresund, kiu forte impresis ŝin.	p.7 p.8
Jeannine kaj Gérard Layseman proponas al vi gustumi bonajn kuketojn...	p.8
Kia vi sentas vin hodiaŭ ? Demandas Bérengère Turbillon.	p. 8



Forko timigas



En la XI-a jarcento, bizanca princino, iĝinta edzino de doĝo de Venecio, kunportis strangan etan forkegon kun du dentoj. « Diabla ilo, perdiĝo de la animo, perversaj moroj » ekkriis la eklezio. « Dio donis manojn al la homo, tio estas por uzi ilin ! »

Dum la epoko de Francisco la Unua, en Francujo, la forko timigas ĉar oni povis vundi sin. Henriko la Tria observis la manipuladon de la forko dum restado en Venecio en 1574 kaj adoptis ĝin. Oni primokis lin. Unue la forko nur utilis por piki la viandpecojn en la plado. Dank'al ĝi, oni ne bezonis serĉi la viandpecojn falintajn en la faldojn de la kolumo. Malgraŭ tiu avantaĝo, la forko malfacile sin trudis. Necesis atendi la finon de la XVIII-a jarcento por ke ĝi konkeru la burĝajn domojn. La kvardenta forko anstataŭis la dudentan.




Forko el la XVIa jarcento,
Muzeo de Laon

Sur la tabloj, oni lokis la forkon dekstre de la telero kun la tranĉilo. En la XIX-a jarcento, pro la alkutimiĝo al ĝia manipulado, ĝi transiris maldekstren. La franca kutimo meti ĝin la dentoj malsupren havas la jenan kialon : oni grifelis la blazonon sur la ekstera parto de la tenilo. En Britujo, la blazono situas sur la interna parto, do oni surtabligas la forkon la dentoj supren.

La diversigo de la formoj atingas sian apogeon en la XIX-a jarcento : forko por ostroj, helikoj, forketo por litorinoj, fiŝoj, por melonoj kun tranĉaj dentoj, kukoj kun du dentoj, fruktoj kun tri dentoj, por fromaĝoj…Sen forgesi pli grandajn modelojn por servi, kaj specialajn forkojn por la servo de la olivoj, sekaj kolbasoj, salato…

Dominique Baron

Trovu la uzon de tiuj forkoj



Solvo paĝo 2

Por kio oni uzas tiujn forkojn :
1 : spagetoj
2 : pico
3 : fiŝaĵo

● ● ● ● ● ● ● ● ●

LA TANDEMA TRAIRO EN KUBO
(Februaro-Marto 2011)
Partoprenantoj : Kristoforo, Marlène, Johano-Jakobo

Post halto en Moskvo, la aviadilo surteriĝas en Havano. La doganistoj ne estas ridetemaj, la kameraoj filmas nin de la kapo ĝis la piedoj eĉ ambaŭflanke. Dank'al Kristoforo kiu parolas la hispanan, la formalaĵoj ne tro daŭras.

Ekstere de la flughaveno, buseto ŝajnas atendi nin. Post traktadoj, la ŝoforo konsentas veturigi nin ĝis la « Kasa Partikular » en kiu ni restados dum kelkaj tagoj por kutimiĝi al la vetero. Ĉi-tie la kvartalo nomiĝas VEDADO, la domoj estas pli bone zorgitaj ol aliloke. La konstruaĵoj estis pagitaj de la usona mafio en alia epoko.

En la kvartaloj, kvankam la loĝantoj atendas longtempe ĉe nutraĵmagazenoj, ili ne ŝajnas malsataj.

Estas malfacile akiri aŭtomobilon, la kubanoj ofte petveturas… kun paperbileto en la mano por instigi la ŝoforojn halti. Sciu ke por aĉeti aŭton estas devige peti permeson de la registaro. Necesas 7 jaroj de salajro por aĉeti skoteron. La mezsalajro estas 15 eŭrojn… po monate.

La unuaj radturniĝoj okazas sur la « Malekon », larĝa trotuaro, kiu laŭiras la oceanon. Ĝi estas la loko, kie la kubanoj ŝategas promeni kaj sunumi. La konstruaĵoj staras ankoraŭ dank'al skafaldoj. Ĉi-tie ni biciklas sur « la promenejo de Angloj »… sen la luksaj domoj kaj la belegaj veturiloj.

Ni renkontas junan fraŭlinon 15 jaraĝan, tutruĝe vestitan. Kiam la junulinoj iĝas 15 jaraĝaj, ili estas la « reĝino dum unu tago ». La gepatroj luprenas vestaĵojn por ili, oni faras fotalbumon, kiun oni montros fiere al konatoj.

En la kirko Saint-François d'Assises, okazas provkanto de junaj gemuzikistoj, kies violonistino estas akompanata de flutistino. Kvankam junaj, ili muzikas kiel profesiuloj. La kirko ne plu estas uzata kiel preĝejo, ĝi multe suferis. Sur la muroj, artistoj pentris okultrompaĵojn, tiel oni vere kredas ke la ĥorejo estas vera. (Kubo estas insulo kun multaj artistoj). Proksime de tie, la « Placo d'Armeo » konsistas el ortangulaj pavimoj el ligno. Sur ĝi staras budoj, kie eblas aĉeti memoraĵojn.

Ni tagmanĝas sur teraso ĉirkaŭata de muzikistoj. Ni gustumas langustojn (tre tre bongustaj). Poste, promenado sur la promenejo « La Prado ». Tie, dum la « bela epoko », la usonanoj friponis. Nun kvankam estas malpermisite oni povas interŝanĝi sian loĝejon kontraŭ alian aliloke, la registaro fermas la okulojn.

Ĉe teraso de kafejo « La Prado » ni gustumas bieron. La restoraciestro volas surseliĝi malantaŭ mi. Li estas 2 metrojn alta, mia edzino 1 metron kaj duonon, mi reguligas la selon kaj ek. La « bestulo » premas la pedalojn kiel ŝi ne kutimas… Post kiam ni revenos gapi ni forlasos la tandemon ŝirmitan sekure ĉe restoracio. Ĉiuj kubanoj timas la ŝtelistojn kvankam ŝteloj ne okazas pli ofte ol en Francio. Tia timo verŝajne datas de kiam estis sklavoj.

La momento por ekiri alveninta, ek al la


Panoramo de Vedado

aventuro ! Ni sciis ke la vojiro estos « venta ». Blovos pruen dum la 1450 kilometroj. Je la unua soriro, la ĉenrada rapidumŝanĝilo de Kristoforo rompiĝas pro la aĉaj deĵorantoj, kiuj senzorge enaviadiligis la biciklon. La ĉeno estas tordita. Feliĉe mi kunportis 2 novajn ĉenojn.

Vespere ni dormas en loko, kies nomon mi ne diros ĉar ni estas kaŝpasaĝeroj. En la ĉambro svarmas dikegaj blatoj kun formikoj, kiuj soriras kaj sobiras laŭ la muroj. La duŝejo ne havas akvon, ankaŭ la akvopelilo, la lavabo havas kranon sed sen tuboj. Sitelo staras kun pelvo. Mi kattualetas kaj mi enŝoviĝas en la dormosakon el silko (he jes sinjoro !).

Aventuro estante aventuro, post dormo ni ellitiĝas frumatene ĉar ni ne volas enkraki pli longtempe la lokon.

Tuj alvenantaj en la urbo Matanzas, gapanto helpas nin por trovi unue dormlokon, due mekanikiston. La kubanoj estas ĉiuj helpemaj, oni povas kalkuli je ili. Ni restados dum 2 tagoj. Ni gustumas la unuajn « pinjakolada-jn ».

La urbo Varadero, ejo por turistoj ne vidos nin, tiaj lokoj ne altiras nin, ili estas nur por turistoj, ne por kubanoj, kiuj havas nur la rajton labori. Feliĉe trinkmonoj plibonigas la vivon. La loko estas administrata de multnaciaj firmaoj, la salajroj estas pagitaj de kuba registaro, kiu fakturas 100 foje pli koste al tiuj firmaoj, la salajrojn.

Por eniri la urbon Matanzas oni devas uzi la ponton sur la interkrutejoj de la « Rio Bacunayagâ ». Matanzas naskiĝis antaŭ pli ol 300 jaroj. La golfeto de Matanzas estis malkovrata en la jaro 1509 de maristo Sébastien de Ocampo. Matanzas signifas « buĉadon » ne pro hombuĉado sed pro bestbuĉado. La unuaj farmistoj ekkreskigis tabakon kaj poste sukerkanon. La sukero kaj la sklavkomerco riĉigis multe la urbon. La nobelaro interesiĝis pri artoj; tiam artistoj, poetoj ekloĝis la urbon.



Ponto de Bacunayagâ

Dum serĉado de biciklriparisto, mia edzino rimarkas presmaŝinan bruon. Morgaŭ ni petos permeson viziti la lokon. La morĝaŭan tagon ni iras surloken. Malfeliĉe estas la presejo de F.A.R. (Fortoj Armitaj Revoluciemaj), la estro indikas al ni adreson de « privata presejo », kvankam « privata » estas vorto, kiu ne ekzistas, tial mi metis citilojn. La presejo estante for, ni veturos per kaleŝo. Alvenantaj surloken, dungitarestrino salutas nin dirante ke estas la 11a kaj duono, la printistoj diboĉiĝos tagmeze, mi insistas kaj ŝi bonvolas ĉiĉeroni nin en la laborejon. Ĉi-tie, ĉio estas pura, la germanaj maŝinoj similas tiujn, kiujn mi posedis en Francio, kvankam ne parolante hispane mi sukcesas komprenigi min. Malfeliĉe la momento tro mallongas, ni devas adiaŭi ne sen forgesi donaci ejfel turon. Staras afero, kiun mi ne komprenas : en la insulo disas multaj presaĵoj, kiuj ne estas printitaj en Kubo, pro tro altaj salajroj (15 €. Po monate)… Mistero ĉu ne ? Multegaj kontraktoj estas faritaj eksterlande. Se la registaro volus, ke ĉiuj farotaj laboroj estu plenumitaj insule mi pensas, ke la popolo povus pli bone vivi memregade… mi karesas tiun deziron…

Sciu ke en la epoko de la malvarma milito, la komunistaj rusoj donis sufiĉe da manĝaĵo al popolo, kiu ne plu bezonis prilabori la kampojn do iris vivi en la urbojn. Hodiaŭ pro malaltaj salajroj ili ne volas translokiĝi denove en la kamparojn… Sufiĉus iom da volo…

La tiea temperaturo tanĝas 45 gradojn, mi komprenas, kial la kubanoj havas la pugojn gluitajn sur ĉio, kio permesas ripozi.

En alia urbo (volonte sennomo), ni dormas sub la tegmentoj bone ventumataj, ni vespermanĝas sur lavmaŝino, manĝaĵon faritan de la patrino de nia gastiganto Fidel. Ni denove estas kaŝpasaĝeroj. Tutnokte ni aŭdas kokojn, hupadon de trajnoj, kiuj signalas sin per hupilo ĉar neniu trakni-

vela pasejo estas en la tuta insulo. Babilemo laŭtega de gapantoj ne mankas, ĉiuj stirantoj hupadas senĉese ĉar hupilo estas tiel utila kiel bremspedalo (laŭ la kubanoj).

La banĉambro estas iom pli bona ol lastfoje.

Johano-Jakobo

Sekvo sur venontaj numeroj

80-jaraj leteroj

La 29-an de Novembro 2011, nia grupo ricevis tiun retmesaĝon :

"Karaj geamikoj,

En la heredaĵo de miaj gepatroj mi trovis multajn esperantajn leterojn el la tempo antaŭ 80 jaroj, inter aliaj ankaŭ leteroj de du francaj Esperantistoj, de Emile Bezier el Tours ... kaj Johano (Jean) Castet el Le Perreux-sur-Marne ... Nun mi skanis la leterojn kaj metis ĝin en PDF-dosieron.

Se vi havas intereson, mi povas sendi al vi tiun dosieron rete.

Amike

Harald Vogel el Dresdeno"

Kompreneble mi tuj respondis, ke tiuj leteroj interesos nin. Kelkajn tagojn poste ni ricevis diskon entenantan la skanitajn leterojn.

Jen la antaŭparolo de Harald Vogel

"Miaj gepatroj estas Linda Vogel (nask. Lesche, 1909-1984) kaj Walter Vogel (1906-1944). Ili esperantiĝis en la jaroj 1928 (mia patro) kaj 1930 (mia patrino, kiam ŝi ekkonis mian patron). Amaŭ estis membroj en la S.A.T. kaj legis la gazeton de la S.A.T. "Sennaciulo". Mia patro metis en la "Sennaciulo" anoncon pri trovi partnerojn por korespondadoj kaj li ricevis multajn respondojn el diversaj landoj: Francio, Svedio, Finnlando, Holando, Sovetunio, Aŭstrio kaj Hispanio. Kiel mia patrino lernis sufiĉe Esperanton, ŝi ankaŭ partoprenis ĉe la korespondado. La plej granda peco de la korespondado finiĝis en la jaro 1933, ĉar la faŝistoj malpermesis la laboristan Esperantan movadon.

Harald Vogel, en decembro 2011




Miaj gepatroj en la jaro 1932



Esperanta kurso de miaj gepatroj

Mi unue legis la leterojn skribitajn de Emile Bezier. Jen parto de la unua.

Por faciligi la legadon mi tajpis la 32 lete-



Tours le 25 de Oktobro 1930.

Kara Kamaradoj

Via letero faras grandan plezuron al mi; ĉar ĝi sciigi al mi ke vi bonvolu korespondi kun mi.

Dankon pro viaj fotoj, ĉar skribante al mi, mi ĝin rigardas. Kajmi kredas pro al mi ĉio estos unu el grandaj ĝojoj ke donnas Esperanto, faligi la lingvajn limojn kiujn disigas la homojn.

rojn. Tiel mi povis eltiri frazojn, kiujn mi provis ordigi laŭ diversaj temoj : familia vivo de Emile ; laboristaj vivkondiĉoj en Francio kaj en Germanio ; politikaj kaj sociaj sciigoj ; Esperanto kaj S.A.T. ; esperantista grupo de Tours ; intimaj konsiloj.

Mi ne korektis la ortografon ; mi miksis la leterojn senditajn al Walter (W antaŭ la dato) kaj al Linda (L antaŭ la dato).

Familia kaj profesia vivo de Emile Bezier :

Via letero faras grandan plezuron al mi, ĉar ĝi sciigis al mi kę vi bonvolu korespondi kun mi.

Dankon por vian foton, ĉar skribante al vi, mi ĝin rigardas kaj mi kredas paroli al vi. (W, 25-10-30)



Nun mi devas diri al vi kiu mi estas :

Mi estas 34 jara (mi naskiĝis la 3an de Septembro 1896). Kiel vi miaj gepatroj estis simplaj laboristoj, (mia patro estis forĝisto). Mi ankaŭ vizitis unue la popollernejo). Poste mi lernis la serurarton. En la aĝo de 18 jara (en 1915) mi devis esti soldato por la tutmonda milito, kaj mi estis soldato ĝis la 19a de Septembro 1919.

Tio estas dum tiu malhumana provo kę mi lernis la socialismon, ĉar tie ĉiuj homoj bezonis la unujn de la aliajn. Ofte mi meditis kę se ĉiuj homoj volus tiu ĉi terura milito ne okazus.



Revenante de la regimento mi edziĝis ; kaj nun mi havas knabon 8 jaraĝa. Mi laboris dum unu jaro en serurfabrikejo.

Poste mi trapasis profesian ekzamenon je la fervojo. Nun mi estas mekanikisto sur la lokomotivoj. (W, 25-10-30)

Tio elpravas ankoraŭ la bezonon por la laboristoj unuiĝi internacie.

Krom la socialista partio (SFIO) mi estas membro de la "Esperantista Federacio Laborista" kaj de la "Fervoja sindikato". (W, 25-10-30)

Hodiaŭ estas dimanĉe, la vetero ne estas bela, pluvas, mi ne povas iri promeni, kaj mi uzas la okazon por skribi al vi kaj babili kelkaj momentoj kun vi, mia kara amiko al kiu mi min sentas altirata per granda simpatio. (W, 16-11-30)

Sed kial diri al mi : eble mi hezitos premi la manon de vi, tial vi estas malpura. Ne kredu tion, kara Karl, ĉar ĉiu laboro estas nobla, kaj okazas ofte kę kiam mi estas sur la lokomotivo, ankaŭ mi estas tre malpura, sed tio ne estas grava, kaj mi premas pli plezure la malpuran manon de laboristo, ol tiun de riĉulo, kiu se la manoj estas blankaj, ofte la animo estas nigra, ĉu ne ! (W, 12-12-30)

La 3an de Aprilo mia frato kiu nun estas soldato, venis hejme pasigi forpermeson dum 14 tagoj. Kun li mi veturis al nia naska urbo saluti la tombon de nia patro, du tagoj post ni iris la fiŝkaptadon, ĉar mia frato ŝategas fiŝi. (W, 20-04-31)

...du tagoj antaŭ fiŝi, mi ĵetis en la rivero, multe da lognutraĵojn. Ni estis suficĉe ŝanculoj ĉar ni kaptis multe da fiŝojn kaj la vetero ĉiam estis belega. Dum la paskfestoj mi ankaŭ akceptis samfamilianojn miajn, kaj nature, kiam ni estas kune ni la tempon ne trovas longa. Kamarado mia fotografis mian fraton kaj min, mi sendas al vi fotaĵon. (W, 20-04-31)

Laŭ via fotografaĵo, kiun vi sendis al mi, mi vidas kę vi ludas per mandolino do mi dedukĵis kę vi estas muzikamantino, mi ankaŭ ŝatas multe la muzikon, sed mi ne scias ĝin, tion mi bedaŭras multe. Sed mia filo kiu estas 9 jara lernas muzikon kaj jam ekludas violonon. (L, 26-4-31)

Laŭ mia fotografaĵo, vi kredas kę mi havas multajn zorgojn, sed mi devas diri al vi kę mia aspekto estas trompa, ĉar se mi aspektas serioza, tamen mi ŝatas (multe) ŝerci, kaj ridi.

Sed kiam vi estos familipatro vi konstatos kiom de zorgoj oni havas. (Ne kredu min, mi ŝercas). (W, 7-4-31)

Mi konstatas, per la diferentaj fotoj senditaj de vi kaj de Walter kę vi ŝatas multe la biciklopromenadon, vi pravas ĉar kiam mi laboras dum la tuta semajno en la laborejoj, kiuj estas pli malpli puraj mi estas kontenta spiri puran aeron kaj esti karesita de la suno. Ankaŭ mi, kiam mi povas volonte promenas bicikle. (L, 9-8-31)

Antaŭ unu semajno mia frato fianĉiĝis, kaj tio por mi estis okazo por iam festi kaj festeni. Ni bone amuziĝis kaj fine ni enlitiĝis malfrue. La edziĝo okazos komence de la venonta Aprilo. Al mia frato mi deziras bonan edziĝon kiel mi havas, sed sufiĉas pri tio, ĉar eble tio ne vin interesas. (W, 29-11-31)

De longe mi intensis skribi al vi, sed bedaŭrinde mi ne povis tion fari, ĉar de la 2a de Januaro mi estas malsana.

Mi havis gripon, nun mi iom resaniĝis, sed mi ne povas ankoraŭ iri eksteren.

Mi esperas baldaŭ promeni, sed la kuracisto tion permesas nur por ok tagoj. (L, 18-1-32)

Sendube vi scias ke de 4 semajnoj mi estas malsana. (Mi skribas sendube vi scias, ĉar mi kredas ke la K-ino Linda al vi diris tion). (1-2-32)

Nun, ĉiutage, mi rikoltas fragojn, kaj mia edzino kuiras per ili konfitaĵojn, kiujn ni manĝos dum la vintro. (L, 12-6-32)

Sekvo sur venontaj numeroj

Jacques Gaumé

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

LA FLAMBIRDO


En la lasta numero 24 de la Turanĝia Luko, ni prezentis mangaon (japana bildrakonto) NUD PIEDA GEN de NAKAZAWA Keizi

Nun ni prezentas alian faman mangaon, parton de la « **Flambirdo** » de **TEZUKA Osamu (1928 – 1989).** Tiu libro estas la dua parto de 9-voluma serio, kiu nomiĝas « Futuro ». « La Flambirdo » estas la ĉefa verko de TEZUKA.

« **Futuro** » estas scienc-fikcia rakonto, kiu komenciĝis en la jaro 3404 p.K. La tero dezertiĝis. Restis nur kelkaj bestetoj. La homoj konstruis « Eternaj-n Urboj-n » subtere, kie ili povis vivi.

La juna **Masato** preferis fuĝi eksteren. La **Flambirdo** kondukis lin ĝis la kupolo de **D-ro Saruta**, kiu loĝis tie tutsola kiel ermito.

Saruta faris artefaritajn vivaĵojn, kiuj povis vivi nur en vitraj tuboj. Saruta lamentis, kaj petis de Dio : « Bonvolu instrui al mi la misteron de la vivo. Donu al mi ŝlosilon al la enigmo ».



Tiam alvenis la Flambirdo, kiu diris al li : « Mi ne estas Dio, mi estas parto de la Tero, simila al ties ĉelo libere sin movanta, simila al ĉiuj astroj en la galaksio. Ĉiuj aktivantaj astroj « vivas ». Tia estas la kosma vivo ».

Tiam la Flambirdo telepatie parolis al Masato : « Aŭskultu min, la Tero restaŭros neniun alian, krom vin. Tie ĉi vi vivos milionojn da jaroj. Vi devos vivi ĝis la naskiĝo de nova homaro. Mi faros vin senmorta. Vi nepre plenumos la taskon ».

Do Masato komencis vojaĝon kun la Flambirdo. Li forlasis sian korpon. Li mem estis nura ekzisto (konscio). Ambaŭ ili esploris vivaĵon en korpusklo. Ili plonĝis en ĝian ĉelon. Korpuskloj similas al planedoj.

Poste ili revenis al la origina grandeco. Tuj ili ekgrandiĝis ĝis la makroskopa mondo, tra la suna sistemo, tra la galaksioj... Ili estis parto

de la kosmovivo aŭ kosmozoono (esenco de la kosma vivo imagita de Tezuka) ; ĉiuj de la makrokosmo ĝis la mikrokosmo vivis kaj aktivis.

La Flambirdo : « Mi kreis la Homaron kaj lasis ĝin evolui, sed ĝi evoluis laŭ malĝusta vojo. Unu fojon ni devas neniigi la Homaron kaj rekrei ĝin. La Homaro renaskiĝos, kaj kons-truos novan civilizacion ».

Denove, jen primitivaj vivantaj korpoj, distingo inter vegetaloj kaj animaloj, mondo de la dinosaŭroj forpereiĝintaj pro limakoj. Poste aperis birdoj, mamuloj, simioj, kaj " Homo Sapiens ". Homoj nomis ĉion nekomprenatan de ili, Dio.

La Flambirdo reaperis post 3 jar-miliardoj ; ĝi demandis al Masato : « Kiel do oni vin vokas nun ? ». « La Homoj, la limakoj kaj la birdoj vokas min Kreinto aŭ Dio ».

Kaj la Flambirdo diris : « ĉio en tiu ĉi universo disflugas amasojn da kosmozoonoj. Kosmozoonoj havas nek grandon, nek koloron, nek pezon. Ili plonĝas en materion, kaj materio aktivigas galaksiojn, planedojn, Teron, bestojn, plantojn, atomojn kaj la elementajn korpusklojn ».

La Flambirdo ekflugis, ĝi brilis hele pro sia giganta energio. Homoj, kiuj vidis ĝin, ektimis kaj adoris.

La birdo fariĝis legenda birdo.

En Rusio oni nomis ĝin « **Fajrobirdo naskita el la Tero**. »

En Ĉinio, oni nomis ĝin « **Feng Huang, birdo de ermito**. »

En Eŭropo, oni nomis ĝin « **Fenikso** » : ĝi bruligas sin senĉese je iu periodo kaj renaskiĝas el la flamo.

Tiu universala rakonto temas por la homoj pri la Vivo kaj la Morto. La verkoj de Tezuka ĉiam entenas en si la demandon « Kio ni estas ? »

Ni kore rekomendas, ke vi legu en E° tiun libron ; ĝi kapablas esprimi ion gravan por infanoj kaj plenkreskuloj, por ne nur japanoj, sed por ĉiuj popoloj en la mondo.

Jean Louis Le Brizault



Ponto Oresund

Dum la lasta U.K., kiu okazis en la dana regurbo Kopenhago, mi partoprenis en kelkaj tre interesaj ekskursoj. Tamen tiu, kiu plej allogis min, estis la transiro de la ponto kaj tunelo de Oresund inter Danio kaj Svedio, kunligantaj Kopenha-go-n kun Malmö. La eksterordinara verko, kiu kostis tri miliardojn da dolaroj kaj kvar jarojn da laboro, estas unu el la plej grandaj inĝenieraj projektoj de Eŭropo. Al ĝia konceptado antaŭe atingis Ludoviko Kristoforo Zaleski, nepo de la kreinto de Esperanto, kiu estis lerta teknikisto pri fundamentado de pilieroj de transmaraj pon-toj.

La fiksa kunligo de Oresund entenas tri grandajn strukturojn: la plej longan submaran tu-nelon (Km 4) en la tuta mondo, kaj vojan kaj fer-vojan; artefaritan insulon (longa km 4); ponton kun sekcio je centren streĉkabloj (km 7,8). Ĉi tiu peza laboro permesas nun al tri kaj duono mi-lionoj da loĝantoj de la areo Kopenhago-Malmö prosperigi vastan centron pri negocoj, transpor-toj, esploradoj, edukado.


Ponto Oresund

La vidado de la ponto, kiu enabismiĝas en la akvon, estis por mi neordinara kaj neforgese-bla sperto, sed estigis iom da timo.

Aliflanke ekbrilis en mia menso la imago de pontoj, kiujn homoj bezonas por realigi inter-kompreniĝon, solidarecon, justecon. Ne deprimu



Hotelo *Bella Centro*
sidejo de la kongresejo

samideanojn malfacilaĵoj antaŭvideblaj nek timigu ilin malproksimeco de la celo. Al ĝi ili orientu sian esperon kaj ĉefe manifestu la naturajn kapablojn. Nur tiel Esperanto eble iĝos lingvo-ponto por la tuta homaro.

Franca Cipriani

Karotaj kukoj kaj salato el valerianelo kaj oranĝoj

Por 4 minikukoj :
- 100 gr da faruno
- 100 gr da raspitaj karotoj
- ½ saketo da gistpulvoro
- 2 ovoj
- 100 gr da raspita parmezano
- 5 cl kaj 1 supkulero da vegetala oleo
- 10 cl da oranĝa suko
- kelkaj kuleroj da lakto
- 30 gr da juglandoj
- salo kaj pipro

Por la salato :
- Valerianelo
- 2 oranĝoj
- 25 gr da duonjuglandoj
- 3 supkuleroj da oliva oleo
- salo kaj pipro

Varmigu la fornon je varmeco 180° (6)

En salatujo, miksu la farunon kaj la gistpulvoron.

Aldonu la tutajn ovojn, la oleon kaj la oranĝan sukon.. Salu, pipru kaj kirlu.

Aldonu la fromaĝon, la karotojn kaj la juglandojn.

Oleumu kaj farunu la muldilojn.

Verŝu la paston ĝis la ¾ de la muldila alteco.

Pere de peniko, ŝmiru la kukojn kun iomete da lakto por ke ili pli bone oriĝas dum la kuirado.

Baku dum 25 minutoj.

Dum tiu tempo, senŝeligu la oranĝojn, elterante la blankan membranon kaj pecigu ilin supre de ujo por rekuperi la sukon.

Preparu la vinagran saŭcon miksante la oranĝan sukon, la olivan oleon, la salon, la pipron.

Lavu kaj sekigu la valerianelon. Miksu la tuton.

Servu la minikukojn (duonvarmajn aŭ malvarmajn) kun la salato.

Jeannine kaj Gérard Layseman

Bérengère (Juanita) Turbillon ricevis tiun poŝtkarton de geamikoj, kiuj partoprenis en la 92-a U.K. en Jokohamo.

Ĝi titolas "Kia vi sentas vin hodiaŭ ? "



Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr